# REVUO KATOLIKA

ALDONO AL KATOLIKA MONDO

NUMERO 2/3 JUNIO/JULIO 1923 I. KOLEKTO


## Konstanz, nia bela kongresurbo


Ĉarmega urbo kunigas en ĉi tiu jaro la Ika-anaron. Cirkaŭita per la grandiozaj svisaj Alpoj, kronitaj de eterna sunbrila neĝamaso, ĝi kuŝas kiel verda juvelo je la bluaj bordlimoj de la lago Bodensee. La imponа kaj samtempe gracia turo de la ĉefpreĝejo „Münster“ superegas majeste la antikvan urbeton romantikan, kiu havas multcentjaran gloran historion.

Jam en la tempo de la romana imperio Konstanz ludis gravan rolon. La romanaj armeestroj tie konstruis fortan kastelon por defendi la Rejntransiron kontraŭ la germanaj gentoj, kiuj antaŭenpuŝite per la pli nordaj slavaj popoloj, kun grandaj amasoj empenetris en la disfalantan Roman imperion.

Pli poste, en la periodo de la franka - germana imperio Konstanz estis ĉefurbo de la duklando „Alemania“ kaj samtempe grava komerca centro por interŝanĝi la varojn inter la nordaj kaj sudaj regionoj de Eŭropo.

Hodiaŭ Konstanz estas internacia banurbo, ĉiujare vizitata per fremdaj gastoj el ĉiuj mondpartoj. La milda klimato donas al tiu feliĉa regiono preskaŭ sudan karakteron.

Inter la ĉefaj vidindaĵoj ni nomas la ĉefpreĝejon „Münster“, antikva sanktejo, konstruita en 10a kaj 11a jarcentoj. Tie okazis la kunsidoj de la famkonata koncilio tutmonda; plue la urbdomon „Rathaus“, kies bildon ni vidas aliflanke; plue la belan Rejnponton, la pordegon „Schnetztor“ kun la domo de Huss (Hussenhaus).



La ĉefpreĝejo „Münster“

En la belega cirkaŭaĵo ni precipe nomas la ĉarmajn insuletojn „Mainaŭ“ kaj „Reichenaŭ“, kie troviĝas praantikvaj preĝejoj kaj monaĥejoj. La kongresanoj vidos dum nia ekskurso tiujn ĉi vere belegajn lokojn.

La katolika vivo de la urbo estas vere viva. Perfekta orginizado de la katolikaj fortoj tie estas trovebla. Spezialan gravecon la urbo atingis per la famkonataj Pente kostaj konferencoj, kiuj ĉiujare okazis depost 1921 sub la eminenta gvidado de dro Baur, kiu estas ankaŭ prezidanto de la tiea loka kongreskomitato. Ĉiujare kunvenas dum


Peutokosto katolikaj politikistoj, ĵornalistoj ktp. el Germanio, Svislando, Aŭstrio ktp. por pritrakti speciale la kunlaboradon de la katolikaj politikistoj por realigo de la vera paco. En ĉi tiu jaro tie troviĝis deputatoj, ĵurnalistoj, gvidantoj, kiuj parte kun granda sentimeco postulis la radikalan aplikon de la papaj principoj por realigo de kristana paco.

Konstanz estas centro por ekskursoj en la svisaj, aŭstraj kaj germanaj Alpoj kun iliaj grandiozaj ĉarmoj kaj ĉarmaj grandiozaĵoj: do venu kaj vidu! K. M.

---

# Bellarmin – Manzoni – Pasteur

La veraj herooj de la homara historio ne estas la grandaj militestroj, ne la reĝoj kronataj aŭ nekronataj, ne la diplomatoj kaj generaloj — kies ĉefa profesio ŝajnas esti detrui la homan feliĉon kaj turmentadi la dolorplenan loĝantaron de l' mondo — sed la veraj heroooj de la homaro estas la sanktaj kaj sanktemaj viroj. Tial ni trovas, ke tiuj heroooj, kiuj fakte antaŭenpuŝas la evoluon de la homa historio, estas religiaj aŭ religiemaj kaj ne malgranda parto de la „granduloj“ de l' mondo estas infanoj de nia eklezio — eĉ sanktuloj honorigataj sur la altaroj de la tuta katolika mondo.




La urbdomo „Rathaus“

Ĉu ne ankaŭ ni festu solene la gloran memoron de tiuj tri brilaj heroooj katolikaj: sankta pastro, mondkonata verkisto kaj fama scienculo, kies eminentan agadon danke rekonas la tuta homaro?

300 jaroj nun estas pasintaj depost la glora morto de la granda kardinalo Bellarmin (naskiĝinta 1542 en Montepulciano, Italio), tiel pia kiel klera pioniro de la sankta eklezio. Post la aliĝo al la societo de Jesuo (1560) li instruis en la universitatoj de Leuven (Belgio) kaj Romo, 1592 li estiĝis estro de la jesuita kolegio en Romo, 1599 li kardinaliĝis. 1605 li formetis tiun altan rangon kaj sin donis tute al la scienca laboro. Preskaŭ neniu grava okazintaĵo eklezia kaj politika estis dum tiu periodo, kie la eminente prudenta kaj sankta pastro ne havis influon. Lia fervoro por realigi en tuta Europo la reformajn decidojn de la Tridentina koncilio ne konis limojn. Sed la plej daŭra efiko rezultis el liaj sciencaj verkoj, precipe la disputationes de controversiis kristanae fidei, kiuj en la tuta mondo faris grandiozan impreson, enkuraĝigis la katolikojn kaj rekondukis multajn jam foririntojn al la protestantaj konfesioj.

Finfine en ĉi tiu jaro la solena beatuligo kronis la gloran vivon de tiu eklezia heroo —

Alessandro Manzoni, la granda itala poeto, naskiĝis 1785 en Milano kaj mortis post glora vivo kiel pia katoliko la 23an de marto 1873 en Brusoglio. Deveninta de antikva nobla familio, la juna poeto post multjara restado en Paris falis en religian kaj politikan radikalismon sub la influo de sia liberpensema patrino. Post sia edziĝo kun Louise Blondel li revenis sincere al la katolika religio 1810 kaj vivis de nun en privata soleco en Milano, siajn riĉajn fortojn donante al la literaturo.



La Rejn-ponto kaj insul-hotelo


Ĝojiga por ni katolikoj estas la fakto, ke la reveno al la sankta kredo ekvivigis la eminentan talenton de nia majstro. Ĉar dum la plifruaj verketoj restis nekonataj, la 1812 elirintaj poeziaĵoj „Inni sacri“ montras profundegan spiriton kaj religian ardon. La mondkonata odo pri Napoleono: Il cinque Maggio rapide disvastigadis lian gloron en tuta Eŭropo. 1827 eliris la plej eminenta verko „I promessi sposi“, hostoria romano tradukita en ĉiuj kulturlingvoj, vere internacia trezoro de la literaturo. Manzoni estas la meritplena kunfondanto de la morderna literaturo itala, la

ĉefestro de la romantiko itala. Sed lia influo transpasas la landlimojn de Italio. Manzoni estas unu el la herooj de la homaro kaj ni katolikoj prave povas esti fieraj, ke li estas unu al la „niaj“.

Alian gloran feston solenas la katolikaro: la unua centjarreveno de la naskiĝo de Louis Pasteur, la mondkonata franca scienculo, la eminentega eltrovisto kaj la konvinkita filo de la sankta eklezio. Fiere sin turnas la okuloj de ĉiulandaj samkredanoj al la patrolando de tiu scienca heroo, kie la mondkonata Instituto de Pasteur, dum centjaroj anoncos al la generacioj la gloron kaj meriton de granda scienculo. Ne estas eble ĉi tie memorigi la multnombrajn sciencajn eltrovojn por kontraŭbatali la diversajn malsanojn, por perfektigi la fisikan kaj kemian sciencojn kaj industriojn. Ni nur menciu la gravajn eksperimentojn, per kiuj Pasteur en jaro 1862 ekzakte refutis la pranasko-teorion, kiu tiam sub la ŝajno de „darvinismo“ influigis la intelektularon de la tuta kultura mondo. Per tiuj eksperimentoj Pasteur estiĝis plej meritplena defendanto de la sankta eklezio kaj samtempe pioniro de la vera scienco.

Ni do ne miru, se la Papo mem sendis specialan reprezentanton al la glora internacia memorfesto, okazinta en Parizo dum majo de ĉi tiu jaro. En la speciala letero, kiu la papo sendis al la festo, ni legas la belegan vorton: Siaj sciencaj esploroj eltrovigis lin ĉiam pli, ke en la fondo de ĉio estas la senfina Dio, kiu lumigis kaj konsolis ĉiujn animojn celantajn Sian kariton.

Eltrovi en ĉio Dion, kiel bela, kiel sankta misio de katolika scienculo! F. J.



La urbo — tutaspekto.

# La sankta jaro 1925

Dum la malfeliĉa Eŭropo pli kaj pli ruiniĝas, la eterna forto de la sankta Eklezio mirinde ekfloras. Inter ĉiuj senfortaj kaj senercergiaj potencoj de l' mondo, la Papo restas la morala centro, la nerompebla roko en la ĥaoso senlima.

Ho glora pruvo de la ĉiela spirito! Ho mirinda kaj videbla montriĝo de la Dia direktado!

Novan glorobrilon ni vidos en la sankta jaro 1925. La Papo kunvokos la grandan ĝeneralan koncilion, interrompita en jaro 1870 por fintrakti la grandajn problemojn de l' Eklezio en la nuna tempo. Kvankam laŭ sciigoj el Romo, la malfacilaĵoj estas tre grandaj, oni esperas sukcesi, ke la grandioza kunsido estos malfermata ĝis la fino de la sankta jaro. Laŭ ĝisnunaj supozoj oni opinias, ke pli ol 1000 episkopoj el ĉiuj mondpartoj partoprenos. Vere la plej bela, la plej glora, la plej necesa „kongreso“ internacia! Venu ho Sankta Spirito, per via elĉiela lumo, ke la sankta jaro estigu sanktiga jaro de la kristanaro.



La katolika popoldomo „St. Johann“

En sama jaro okazos en Romo granda internacia misia ekspozicio tutmonda, ordonata por la Papo Pio XIa. Ĉiuj misiaj kongregacioj, ordenoj kaj institucioj estas invitataj, tie partopreni.

La ekspozicio konsistos el kvin grandaj sekcioj laŭ kvin terpartoj. Oni montros la regionajn vidindaĵojn el misiaj teritorioj, la klimaton, la civilizon de la loĝantaro, la idolanajn kultojn kaj kutimojn, la ilojn kaj metodojn kaj sukcesojn de la misiigo.

**Niaj bildoj** estas disponigitaj afable per la katolika gazeto „Bodenseezeitung“ en Konstanz; tiuj de la lasta numero per l' Union Intern. des Secours aux Enfants, Genèvres, Svisio.

# HIMNOJ

## HIMNO DE FRATO SUNO (Sankta Francisko)

Tre alta ĉiopova bona Sinjoro,
Viaj estas la laŭdoj, la gloro kaj honoro
Kaj ĉiuj benoj.
Nur al vi, Trealta, ili konvenas
Kaj neniu estas inda nomi vin.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, kun ĉiuj kreitaĵoj viaj,
Precipe Sinjoro Suno, nia frato,
Kiu brilas kaj vi lumigas per ĝi:
Kaj ĝi estas bela kaj brilege elradianta,
Kaj de vi, Trealta, ĝi estas simbolo.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, per Fratino Luno kaj [Steloj,
Kiujn vi formis sur ĉielo helajn,
Multkolorajn kaj belajn.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, per Frato Vento,
Kaj per Aero, nuba, serena kaj ĉia Vetero,
Per kiu vi donas vivtenon al viaj kreitaĵoj.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, per Fratino Akvo,
Kiu estas utila,
Multvalora, ĉasta kaj humila.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, per Frato Fajro,
Per kiu vi lumigas la nokton.
Kaj ĝi estas bela kaj gaja, potenca kaj forta.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, per mia fratino la Tero.
Kiu nin nutras kaj portas,
Kaj produktas fruktojn diversajn kun koloraj floroj kaj berboj.

Laŭdata estu, mia Sinjoro,
Per tiuj, kiuj pardonas pro via amo,
Kaj suferas malsanojn kaj dolorojn:
Beataj tiuj, kiuj suferas ilin trankvile
Ĉar de vi, ho plej Supera, ili estos kronataj.

Laŭdata estus, mia Sinjoro,
Per nia Fratino, la korpa Morto,
Kiun neniu povas forkuri:
Ve al tiuj, kiuj pereos en kulpoj mortigaj!
Beataj, kiuj troviĝas en viaj tre sanktaj voloj
Ĉar la dua morto ne faros al ili malbonon.

Laŭdu kaj benu mian Sinjoron
Kaj danku lin kaj servu al li per granda humileco.

Esperantigis F. Stefano de Carolis,
San Damiano, Assisi.

## AVE MARA STELO

Ave mara stelo,
Dipatrino milda,
Kaj por ĉiam virga,
Ĉielpord' feliĉa.

Prenis tiun Ave
Vi de Gabrielo,
Gardu min en paco,
Ŝanĝu Eva-nomon.

Solvu la katenojn,
Lumu al la blindoj,
Pekojn niajn pelu,
Ĉiajn bonojn petu.

Montru vin patrinon;
Per vi prenu preĝojn,
Kiu naskiĝinta,
Filo estis via.

Virgo unuspeca,
Inter ĉiuj milda,
Faru, senkulpitajn,
Mildajn nin kaj ĉastajn.

Vivon donu puran,
Vojon faru certan,
Ke vidante Jesu'n
Ĉiam ni ĝojegu.

Laŭd' al Dio Patro,
Al la Kristo gloro
Kaj Spirito Sankta,
Al Triunuo honor'.
Amen.

Originale tradukita por „katolika preglibro".

## HIMNO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Nin kunigas katolika sento;
Tra la mondo iras nia voko
Kaj per forta volo en konsento
Estu Dia glo', en ĉiu loko.

Kaj al mond' eterne militanta
Kiel disrompita familio,
Nur la kredo kuru soifanta
De ĉiela daŭra harmonio.

Per la fido pura de miljaroj
Malaperu de l' erar' la vorto;
Estu preĝoj la defendaj baroj
En batal' kun la diabla forto.

Nia laborema kolegaro
En agado bela ne laciĝos
Ĝis la leĝo de la Kristanaro
Por eterna beno plenumiĝos.

Rekantaĵoj: Vivu la Kruco, ilo de venko,
Savu la mondon, brilu sur ĝi!

Teksto: F. Pizzi. muziko Sante Zanon,
Venezia, San Croce 2133

Eldonejo: Paulus-eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5. — Posedanto kaj Eldonisto: „Ika", Graz, Karmeliterplatz 5. — Responda Redaktoro: Dr. M. I. Metzger, Graz, Karmeliterplatz 5. — Presejo: Paulusdruckerei, München, Isabellastrasse 40.

UNIWERSYTET KUL